

# L<sup>★</sup>umo

ISSN: 0827-3154

*Euhavo skiza*

*Kanadaj novaĵoj 3*

*Raportoj kaj kontribuajtoj 15*

*Diversaĵoj 35*



*Lindato por la  
venonta numero*

*La 20a de novembro 2018*

*[lumo.revuo@gmail.com](mailto:lumo.revuo@gmail.com)*

# Detala enhavo de la numero

Redaktorina rubriko .....	1
<b>KANADAJ NOVAĴOJ .....</b>	<b>3</b>
Nekrologa rubriko: forpaso de Matthew Chisholm ...	3
Estrara priskribo .....	5
Esperanto2020: Monkampanjo de KEA .....	10
Kalendaro .....	14
<b>RAPORTOJ KAJ KONTRIBUAĴOJ .....</b>	<b>15</b>
Raporto pri la 9-a TAKE .....	15
Sankta semajno en Antiguo .....	23
Diplomatio kaj lingvoj .....	29
Speciala koncerto en Viktorio .....	34
<b>DIVERSAĴOJ .....</b>	<b>35</b>
Krucvortenigma solvo .....	35
Kontribuantoj .....	36

*Lumo estas la revuo de la Kanada Esperanto-Asocio.  
Por membriĝi en KEA, vizitu nian [retejon](#).*

# Redaktorina rubriko

**Karaj legantoj,**

**Post tiom da tempo sen novaĵoj de Lumo, mi ĝojas dividi  
kun vi la unuan numeron de 2018!**

**Mi pardonpetas al la legantoj pro tiu prokrasto.**

**E**kde ĉi somere, ĉiuj en la kanada Esperantujo (kaj eĉ pli fore) sentas la mankon de unu el la plej aktivaj membroj de KEA, Matthew Chisholm, kiu forpasis subite en kortuŝita kundesko. Li estis la sekretario de KEA kaj la prezidanto de la Esperanto-klubo de Toronto. Lia aktiveco por la kresko de la loka kaj nacia movado estis modelo, kaj li multe kuraĝigis min kiam mi ekis kiel redaktorino de Lumo. Jen, por komenci la numeron, Detlef Karthaus verkis omaĝon al Mateo por la nekrologa rubriko.

En 2018 nova estraro de KEA elstariĝis kaj, pro la forpaso de Mateo, adapto necesis. Vidu la estraranojn en la Estrara Priskribo kaj malkovru kelkajn el ili (la aliaj sinprezentoj estos en la decembra numero). Aliteme, Ĵenja Amis, de la LKK por la UK-2020 en Montrealo, klarigas kiel progresas la pretigo de la evento, kaj invitas vin partopreni en la monkampanjo de KEA. Parolante pri eventoj, la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE) okazis de la 6a ĝis la 8a de oktobro. Se vi partoprenis, bonvolu skribi al ni por dividi la etoson de tiu renkontiĝo. Ĉiun 15an de decembro, esperantistoj de la tuta mondo celebras la Zamenhof-feston. Jam estas tempo por prepari agadon kun via loka klubo!

# Redaktorina rubriko

Post la printempa alvoko por kontribuaĵoj, ni ricevis interesajn tekstojn. Unue, oni vojaĝos kun Zdravka Metz al Kubo kun ŝia raporto pri la 9a-TAKE (Tutamerika Kongreso de Esperanto), kiu okazis en februaro 2018. Ŝi prezentas la programon de TAKE, kies tre interesa temo esti *"Lingvoj kaj kulturoj: edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj"*. Oni vojaĝos ankaŭ kun Lottie Ericson dum la Sankta semajno en Antigvo-Gvatemala. Preparu vin, vi vidos belegajn bildojn! Sekvos artikolo pri Diplomatio kaj Lingvoj, eltirita el la persona blogo de Yury Jakymec. Poste, Ardeo Mann rakontas en artikoleto pri Speciala Koncerto en Viktorio, kiu okazis ankaŭ en februaro. Fine, vi povos trovi la solvojn de la lasta Krucvortenigmo.

Bonan legadon!

**Kamila**

[Camille-Amélie Koziej Lévesque]

**Redaktorino**



# KANADAJ NOVAĴOJ



## Nekrologa rubriko **Matthew Chisholm** **(1978-2018)**

Verkita de Detlef Karthaus

**M**atthew (Mateo) J.S. Chisholm (1978-2018), sekretario de KEA, kaj prezidanto de Esperanto-Toronto mortis la 1-an de Aŭgusto en Toronto, unu semajno post la forpaso de lia partnero Jake Freeman.

---

Kiam en 1999 li unue elektiĝis prezidanto de nia tiam nomata Esperanto-Rondo de Toronto li estis la plej juna prezidanto en la historio de nia klubo.

Per liaj organizaj kapabloj kaj vizio li pliigis siajn membrojn kvinoble. Sub lia deĵoro la Toronta klubo gastigis en 2015 Mekaron (Mez-kanada-renkontiĝo), kiu en tiu jaro estis la plej granda Esperanto-aranĝo en Nord-Ameriko.

Mateo lernis Esperanton kiel junulo per la perpoŝta 10 leciona Free Esperanto Course. Lia instruisto estis Alice Kazmierowski, jam longdaŭra membro de la Toronta klubo, tiel ke Mateo tuj havis aliron al organizita Esperanto-rondo. Li baldaŭ fariĝis ĝia prezidento kaj starigis kurson por komencantoj, kiun li mem instruis. Konsciente pri la historio de nia klubo, estis lia ambicio revivigi ĝin al ĝia antaŭa gloro, kion li nomis la "bela epoko". Tio estis la postmilita tempo kiam la klubo allogis multajn enmigrintojn kiuj jam parolis Esperanton sed ankoraŭ ne regis la anglan, tiel ke krokodilado ne eblis.

Mateo estis jam lingvemulo en juna aĝo. Li estis membro de infana ĥoro kie li lernis la perfektan prononcadon de la germana por kanti la lidociklon "Die schöne Müllerin"

(La bela muelistino) de Franz Schubert. Li frekventis dulingvan lernejon, kiun li nomis la "franc-entempa lernejo", laŭvorta traduko de la angla "French immersion." Li ĉiam havis fortan intereson pri la gaela lingvo, kiun li bone parolis kaj studis ĝis lastatempe, estante estrarano de la Gaela Societo de Toronto.

Mateo laboris por la Ontaria registaro en la ministerio pri la medio, kie li plenumis la oficon de dulingva prijuĝisto de permesilpetoj, kaj ankaŭ estis komisiito de la sindikato. Liaj kolegoj priskribis lin kiel fonton de informo kaj laŭdis lian entuziasmon kaj kapablon kiel instruisto. Lastatempe li organizis franclingvan klubon en sia oficejo por helpi kolegojn ekzerci sin en tiu bezonata laborlingvo.

Li mankos al ni ĉiuj.



# Estraro de KEA 2018-2019

**Prezidanto:** Paul Hopkins

**Sekretario:** Andrew Sly

**Kasisto:** Raymond Brisebois

**Estraranoj:** Bob Williamson,  
Geoffrey Greatrex,  
Ardeo Mann,  
Kamila Koziej Lévesque,  
Jed Meltzer,  
Ĵenja Amis

**Kelkaj estrarnoj sinprezintas.**

**Legu kaj malkovru ilin!**



## Geoffrey Greatex

Ⓛ Mi esperantistiĝis jam en 1986, lerninte la lingvon en mia lernejo en norda Anglio. Dum miaj universitataj studoj en Oksfordo mi aktivis en JEB (Junularo Esperantista Brita) kaj EAB (Esperanto-Asocio de Britio). Dum ioma tempo mi prezidis unue la junularan sekcion, poste la nacian asocion; mi ankaŭ redaktis la revuon de JEB, Saluton! En 1998 mi forlasis Brition kaj alvenis al Kanado, kie mi enposteniĝis en la universitato Dalhousie, Nova Skotio. Tie mi instruis dum tri jaroj. Finfine en 2001 mi revenis al mia naskiĝurbo, Otavo, kie mi daŭre instruas en la tiunoma universitato. Mi estas fakulo pri antikva historio kaj interesiĝas ĉefe pri

la 'malfrua antikvo', t.e. la periodo de la 'falo' de la romia imperio, sed atentindas, ke la orienta imperio pludaŭris ĝis 1453.

Jam en 1999 mi fariĝis estrarano de KEA kaj prezidis la asocion dum du jaroj (2003-4, laŭ mia memoro); mi nun estas ĝia vicprezidanto. Mi ankaŭ redaktis la bultenon, kiun vi nun legas, dum pluraj jaroj, kun la helpo de Steĉjo Norvell. Mi baldaŭ instruos komencan E-kurson en Otavo kaj jam antaŭĝojas pri la UK, kiu okazos en Montrealo post du jaroj. Samtempe, mi kontentas, ke la estraro de KEA lastatempe grandiĝis kaj juniĝis - kaj mi kaptu la okazon ankaŭ gratulian redaktoron, kiu nun lerte kaj efike pretigas la revuon.







Bob Williamson

↳ Kiel dekkelkjarulo mi unue eksciis pri Esperanto sed nur eklernis ĝin dum la fruaj okdekaj jaroj, post kiam mi aŭdis anonceton en loka radio pri senkosta perpoŝta kurso. Antaŭ ol mi finis la kurson sub la gvidado de Kim Keeble, mi jam fariĝis grupano de la Halifaksa diskut-rondeto sub la tiama gvidado de Harry Lewis, poste Steĉjo Norvell. Tiu grupo ankoraŭ ekzistas kaj evoluadas. Inter 1986 kaj 2008 mi redaktis ĉiumonatan 3-paĝan gazeteton Inter Ni de la halifaksa rondo dum la plejparto de ĝiaj 22 jaroj. Dum jaroj mi jam partoprenadas en la estraro de la Kanada Esperanto-Asocio, eĉ kiel prezidanto (2010-2013), kaj nuntempe mi laŭeble helpas provlegi ĝian revuon, Lumo.





→ Ardeo Mann

☞ Saluton!

Mi nomiĝas Ardeo, mi dudek jaraĝas kaj estas mia unua jaro kiel estrarano de KEA. Mi loĝas ĉe bieno ekster la urbo de Viktorio en la teritorio de la WSÁNEĆ (Saneĉaj) popoloj. En la estraro, mi respondecas pri junulara agado kaj mi esperas revigligi nian junularan sekcion kaj aldoni iom da amuzaĵo al nia asocio. Mi tre volonte aŭskultos viajn ideojn pri la estonteco de junularaj aferoj en la lando kaj helpos realigi tiujn revojn.

Kiam mi ne esperantumas, mi ofte troviĝas en la arbaro aŭ apud la oceano. Mi ŝatas legi, bicikli, tendumi kaj vojaĝi. Mi laboras kiel bienisto ĉe malgranda legoma bieno kaj aktivas en grupo kiu faras edukadon por aliaj kviraj junuloj.





## Kamila Koziej Lévesque

☞ Saluton, (ankaŭ mi)!

Mi estas ino el Saguenay (fora regiono de Kebekio) kiu esperantiĝis babilante dum kongresoj en 2015, kvankam mi konis la lingvon antaŭe, dank' al mia patrino, Tamara Koziej (Tamara ne Amara). Mi estas 24-jaraĝa kaj mi zorgas pri la preparado de la revuo Lumo ekde kiam Geoffrey Greatrex transdonis la rolon de ĉefredaktoro. Tiel, mi eniris la estraron de KEA kiel gasto en 2016 kaj kiel estrarano en 2018. Mi partoprenas en pluraj sociaj movadoj kaj interesiĝas pri diversaj aferoj; mi studis arton kaj studas nun sociajn sciencojn, precipe internacian kunlaboron kaj sociologion. Pro tio, mi ne ĉiam sekvas la kalendaron, sed mi trovas novan entuziasmon por la E-movado ĉiam kiam mi spertas esperantujon. Mi intencas translokiĝi kaj volontuli en la organizado de la UK 2020 en Montrealo, kaj varbi pli da junuloj!



**ESPERANTO  
2020**





**MONKAMPANJO  
DE KEA**

**Karaj amikoj,**


**Ni ŝatus kun fiero informi vin, ke la laboroj por la preparado de la Universalan Kongreson de 2020 en Montrealo bone progresas! La kongreso okazos en la hotelo Sheraton (urbocentre), la 1-8an de aŭgusto, 2020. Jen la resumo de niaj agadoj kaj, kompreneble, la invito kunlabori! :)**

- Ni jam havas emblemon! La koloroj de la logotipo estas la ruĝa, blua kaj verda. Oni povas libere interpreti la signifojn, aŭ oni povas ankaŭ pensi pri la verdo de Esperanto kaj de la naturo, ruĝo de Kanado kaj de la suno (ja en pluraj kulturoj suno estas ruĝa!), kaj bluo de Kebekio aŭ de la riveroj kaj maroj. Sur la logotipo estas Montrealo, kun la monto Mont Royal, la riverigo Sankt-Laŭrenco, kaj la ponto super la riverigo (oni ankaŭ povas pensi pri Esperanto kiel la ponto inter lingvoj kaj kulturoj).

- 
- Ni aperigis la Unuan Bultenon! La Unua Bulteno estas la unua informilo pri la UK, kiu kutime aperas unu jaron antaŭ la kongreso. Esceptokaze, ni produktis ĝin du jarojn antaŭe, por bone "antaŭeniri" kaj bone reklami la eventon, ĉar varbi homojn al Montrealo estas gravega tasko, ja ni esperas havi grandegan eventon!
  - Ni multe reklamis la UK-2020 dum la UK-2018 en Lisbono! Ni havis tablon kun broŝuroj kaj aliaj materialoj. Ni ankaŭ montris videon pri Montrealo dum la programero dediĉita al la venontaj kongresoj kaj eĉ disdonis acerbombonojn fine de la programero (oni multe aprezis tion!). Kompreneble, venontjare, en Lahtio, ni reklamos eĉ pli multe!
  - Ni kreis informilojn pri Esperanto kaj la UK, dank' al la subteno de KEA! Estas tre belaj vizitkartograndaj faldeblaj informiletoj en la franca kaj en la angla kun la enkonduka lecioneto pri Esperanto kaj la kontaktinformoj kun KEA, ESK kaj Esperanto-USA. (Kanadanoj rajtas ricevi la informiletojn senpage laŭ la peto al KEA aŭ ESK).
  - Ni sukcese reklamis Esperanton kaj la UK-on dum LangFest en Montrealo! LangFest estas jam tradicia nordamerika aranĝo por lingvemuloj. Dank' al subteno de ESF kaj KEA, ni havis belan Esperanto-budon, tutpaĝan reklamon pri la UK en la programo, kaj, kompreneble, ni disdonis la informilojn, parolis al eble centoj da homoj, kaj okazis Esperanto-ateliero (fare de Chuck Smith). Ni ankaŭ konatiĝis kun multaj Esperantistoj, kiuj lernis la lingvon per Duolingo aŭ alimaniere sed neniam partoprenis Esperanto-aktivaĵojn ĉeeste -- ĉiuj promesis veni por la UK! :)



La venontaj du jaroj estos ege gravaj kaj laborpostulaj por la LKK kaj ĉiuj helpantoj. Ni devos daŭre multe reklami la eventon, larĝigi la teamon kaj varbi volontulojn, trovi respondeculojn pri kelkaj gravaj postenoj, ellabori ekskursojn kaj antaŭkaj postkongresojn, krei la serion de prelegoj pri Kanado / Kebekio / Montrealo, trovi partnerojn kaj sponsorojn (financajn, kulturajn, organizajn, ktp.), kaj multege kunlabori kun UEA kaj nia najbara asocio, Esperanto-USA, kies membroj estos en nia pli larĝa teamo. Ni ankaŭ esperas ke Usono havos specialan lokon en la programo (koncertoj, prelegoj, ktp.).




Ni ankaŭ kolektas kontribuojn de esperantistoj por subteni la UK-on en Montrealo. La sumo, kiun ni kolektos, kovros la kostojn, kiujn ne kovras UEA: ekzemple, reklamado de la UK antaŭ la evento, diversaj eventoj ĉirkaŭ la UK (infana kongreseto, ktp.), aldonan reklamadon de la UK en la urbo mem (ekz., ekstera reklamado: banderoloj, flagoj, ktp.; reklamo en Facebook, ktp.). La kolektita mono povas ankaŭ esti uzata por finance helpi al gejunuloj aŭ nepagipovaj homoj partopreni. Ĉiu mono donacita al KEA por la UK estos transdonita al la LKK.

**Por fari donacon al KEA bv. sendi ĉekon al nia kasisto ĉe 414-110 Grand Avenue, London ON N6C 1L8 (indiko "Esperanto 2020"), aŭ uzi la retpaĝon [esperanto.ca/eo/kea/membreco](http://esperanto.ca/eo/kea/membreco).**

**Oni ankaŭ povas donaci rete ĉe :**

- [canadahelps.org/en/charities/kanada-esperanto-asocio](http://canadahelps.org/en/charities/kanada-esperanto-asocio) (angle)
- [canadahelps.org/fr/organismesdebienfaisance/kanada-esperanto-asocio/](http://canadahelps.org/fr/organismesdebienfaisance/kanada-esperanto-asocio/) (france).



Kompreneble, krom la subteno financa, ni bezonas vian subtenon kiel volontulon: gvidi ekskursojn, traduki, registri kongresanojn, helpi bonvenigi la gastojn de la tuta mondo. Tio estas granda laboro, sed laboro ege ĝinda kaj persone riĉiga sperto. Ni baldaŭ dissendos enketilon por varbi volontulojn en Nord-Ameriko, sed ni bonvenigas viajn sinproponojn kaj ideojn ĉe [volontuloj2020@gmail.com](mailto:volontuloj2020@gmail.com)!

**Dankegon pro via helpo kaj subteno!**

**Amike via,  
Ĵenja Amis, nome de KEA kaj la LKK por Montrealo-2020**



## Kalendaro de venontaj eventoj

Lokalaj renkontiĝoj

*Meetup*   amikumu

**15 decembro**  
Zamenhofa festo

Profitu de la okazo por pripensi agadojn,  
prelegojn rilate al la UK 2020, kaj amuzu!

**pasintaj**

## Kalendaro de venontaj eventoj

103a UK en Lisbono, Portugalio;  
74a IJK en Badajoz, Hispanio;  
Paralela Universo;  
ARE.

Rakontu viajn e-eventojn kaj sendu raporton ĉe  
[lumo.revuo@gmail.com](mailto:lumo.revuo@gmail.com)



# RAPORTOJ KAJ KONTRIBUAĴOJ

ZDRAVKA METZ

## RAPORTO PRI LA 9-a TAKE

### **(Tutamerika Kongreso de Esperanto), 11-17 februaro 2018**

— En sabato, la 17-an de februaro finis en Havano la 9-a TAKE kiun partoprenis 240 esperantistoj el 18 diversaj landoj kaj el ĉiuj partoj de Kubo: de la plej fora Guantanamo kaj Santiago de Cuba - oriente; de norda - Holgin, Las Tunas kaj Matanzas, ĝis Cienfuegos kaj Trinidad - sude. Menciindas ke krom el Azio kaj Eŭropo ĉeestis homoj el ĉiuj tri Amerikoj. Do, la kongreso estis vere Tutamerika, despli en la jaro, kiam TAKE festas sian 40-an jariĝon, malgraŭ siajn nomojn kiuj ŝanĝiĝadis de 1978, kiam okazis la unua tiam - Latinamerika Kongreso de Esperanto en San-Paŭlo, Brazilo.

La temo de ĉi jara TAKE estis - *"Lingvoj kaj kulturoj: edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj"*.

La aktualan temon oni diskutis en tri grupoj dum ĉiuj sesioj por ke ĉiu povu esprimi sin parolante pri konoj kaj spertoj en siaj regionoj kaj landoj. Iom pli pri la temo kaj pri la decidoj vi povos legi post la fino de ĉi raporto, en la kongresa rezolucio.

Mi pasigis kongreson ĉefe vizitante programerojn, krom unu posttagmezon kiam mi aliĝis al ekskurso kaj vizitis malnovan parton de Havano.

Gravaj programeroj okazis, kunlabore kun UEA:

- AMO (Aktivula Maturigo) seminario por instrui aktivulojn kunlabori internacie, malfermaj al novaj ideoj kaj al influoj kaj tendencoj en la granda mondo. Estis invititaj 25 aktivuloj el tri Amerikoj ke ili tiele spertiĝu kaj poste agu en siaj regionoj. Ĉeestis ankaŭ multaj E-oj el Kubo ĉar tio estis bona okazo renkonti reprezentantojn de UEA - Sara Spanò, kaj de TEJO - Francesco Maurelli.

- ILEI ekzamenoj, kiujn faris multnombraj junaj kaj malpli junaj kubaj esperantistoj. La lastan tagon ili ĉiuj meritis sian diplomon.

TAKE pliriĉigis ĉeestantojn per diversspecaj interŝanĝoj, ĉefe homaj. Oni povis aŭdi pri kulturo de Kubanoj, oni lernis pri: tradicia folkloro kuba muziko, afrik-

hispane devena; pri *treso* – muzika instrumento, simila al gitaro, havanta 3 foje du kordojn kaj sonas aliel; pri dancoj kaj kantoj. Prelego pri la *guayabera* - la tradicia kamparana vestaĵo, fakte blanka ĉemizo, komprenigis al mi kial eĉ ordinaraĵoj kaj diverskoloraj ĉemizoj havas vertikalajn kvin faldetojn. La kvar poŝoj gravas ke ĝi aspektu pli kubeca ekde la jaro 1709. En la urbo Sancti Spiritus estas la muzeo - inter pli ol du cent ekspoziciaĵoj, troviĝas ĉemizo grandega kiel muro, jes, kudrita de blanka kotona tolaĵo, same kiel tiu plej eta por unujara infano. Ne mankis informoj pri: Sansistemo en Germanio, Ginsengo, Eldonejo MAS (Monda Asembleo Socia), Yumeiho-terapio, Dancateliero, Origamio kaj ankoraŭ multaj aliaj.

Programo, riĉa enhave okazadis, foje samtempe, en tri lokoj kaj mi devis elekti laŭ plaĉo kaj intereso: prelegojn, prezentojn, atelierojn, filmoprezenton, forumon, konversacian rondon; preparita kvizo pri historio de Esperanto estis dinamika kaj amuza ludo. Du kubaj amatoraj teatraĵetoj pri la vivo de "Emelina" de Eugenio Hernandez Espinosa, nuntempa dramisto kaj "Francisca kaj la Morto" de Onelio Jorge Cardoso, elstara verkisto, ridigis publikon kaj eltiris longajn aplaŭdojn por kubanoj kiuj aktoris. Vesperaj programeroj: Interkona vespero, Esperanto-kabaredo, vesperoj Nacia, Baleda, Teatra, Adiaŭa, ĉiuj distris ĉeestantojn. Foje pro pluvo, foje pro fino de spektaklo disiĝis la homoj ĝuante esperantan kunvivadon de amikeco kaj frateco. Bone elektitaj kaj gviditaj komunaj programeroj instigis plenan partoprenon de ĉeestantoj

kiuj recitis poemojn, rakontis aŭ legis anekdotojn, kunmuzikis, aŭ individue pian- kaj gitar-ludis. Tiel la programo estis plaĉa por ĉiuj kaj permesis ekkoni tiujn kaŝitajn talentojn kiuj permesis plezure travivi memorindajn momentojn en Esperantujo.

El foraj kubaj urboj venis duopo - La Fratoj El, kiuj rap-is esperante. Neesperantista bando - Kialo - havis etan repertuaron en Esperanto. La grupo Amindaj preparis ferman koncerton. Ili dancigis ĉiujn en ritmo de Kubo kaj kantigis Guantanamo. Eĉ la pluvo ne povis disigi TAKE-anojn antaŭ la fino de adiaŭa vespero.

Plezura por multaj estis teatraĵo "La kredito" de Jordi Galceran en kiu ludis Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik. Ilia ludo kaj aludoj sur scenejo, pro la lingvo agrabla, komprenebla, ridigis publikon, sed la fino de la spektaklo estis iom kliŝa, banala. Ĉu E-oj preferus ĝui lingvon sur scenejo per pli originala temo kaj ne ordinara??? - restas la demando.

La organizantoj montris sian lertecon pri logistiko de ĉiutaga transporto de eksterlandaj kongresanoj de loĝkvartalo, kie situas KEA (Kuba Esperanto Asocio) al kongresejo matene kaj reen vespere. Tiuj kongresanoj certe ne forgesos dimanĉvesperon, iom aventurec-aspektan revenon per malnovaj taksioj kiuj sekvis unu la alian. Du-tri foja haltado timigis kelkajn aŭ ridigis kaj amuzigis aliajn, manko de benzino ĉe du malnovaj

aŭtoj estis, ja, la kaŭzo. Certe por tiuj homoj restis kiel neforgesebla, stranga, nokta veturado.

TAKE-anoj partoprenis ekskursojn, plurajn duontagajn kaj unu tuttagan al nacia Parko Vinales por vidi la valon kaj karstajn rondmontetojn kiuj famigis ĝin. Duontagaj vizitoj okazis ene de la urbo - ĉu malkovri diversajn kvartalojn de Havano, rezidejon laŭ la vojo de E.Hemingway, viziti ĉinan kvartalon de la urbo, aŭ vidi Ekrigardon al la universo de la oriŝoj, tradicio de santerio kaj aliaj afrikdevenaj religioj.

Mi vojaĝis fore, kion mi diru pli? En Havano, dum TAKE, mi trovis novajn, revidis multajn malnovajn geamikojn kun kiuj mi povis dividi neforgeseblajn momentojn, dirante al mi mem – jes, indis vojaĝi por tiu bela renkontiĝo.

## **Rezolucio de la Kongreso notita kaj sendita al mi de Maritza Gutierrez**

La kongresa temo de la 9<sup>a</sup> Tutamerika Kongreso de Esperanto havis entute kvar sesiojn. Unue okazis enkonduka prezento dimanĉe la 11an de februaro. Tri demandoj estis starigitaj por pridiskuto en la 2<sup>a</sup> Sesio.

Kio estas daŭripova evoluo? Kiel eduki infanojn kaj gejunulojn por daŭripova evoluo? Kiel rolas la lingvo en la edukaj procezoj?

En la dua sesio de la kongresa temo okazinta en lundo la 12an de februaro, oni diskutis la demandojn en tri subgrupoj, kiuj interŝanĝis argumentojn kaj prezentis raportojn pri siaj diskutoj, kiuj ĉefe rilatis al la nuntempaj problemoj pri la edukado al infanoj.

Oni konstatis, ke tra la tuta mondo estas similaj problemoj kaj defioj

pri protektado de infanoj, pro la abundo de perforto en la amaskomunikiloj, interreto, la situacio en lernejoj kaj edukado hejma; oni esprimis zorgojn pri kiel protekti la naturon; pri nebonaj kondutoj tiurilate; kaj en la tria demando oni skizis la esencan rolon de lingvoj en la edukaj procezoj.

Du pliaj demandoj estis starigitaj por pridiskuto en la tria sesio: Kion vi scias pri la lingva situacio en Ameriko kaj aparte pri indiĝenaj lingvoj? Kiel ni esperantistoj povas kontribui per la lingvo Esperanto al daŭripova edukado?

En la tria sesio okazinta en mardo la 13-an de februaro, la kongresanoj laboris grupe kaj raportis pri la

situacio en Kanado kaj Mezameriko, kaj oni ankaŭ interparolis pri la situacio en Kubo kaj la lingva heredaĵo de la indiĝenaj praloĝantoj.

Oni raportis pri projektoj en Amazonio koncerne protektadon de aŭtoktonaj lingvoj kaj ankaŭ pri la bezono ke la movado engaĝu sin en konkretajn projektojn de la lokaj komunumoj por protekti la medion, arboplantadon; ligi sin al tiuj grupoj kiuj prezentas bonan ŝancon por kunhelpi ke la infanoj, gejunuloj kaj ties gepatroj estu edukataj konsidere al la bezonoj de la homoj kaj la naturo.

Oni proponis por la fina sesio esplori la eblecon engaĝi sin per konkreta agado en la komunumo, kiu povus montri ke la esperantistoj prizorgas tiujn ĉi temojn kaj pretas kunlabori.

Tempomanko malebligis aranĝi ion tian, tamen, ni konsideras ke estas tre bona ideo planinda por estontaj tiaspecaj aranĝoj en la koncernaj loĝlokoj. Oni parolis pri tio ke en Kubo la esperantistoj siatempe provis kaj eĉ fondis grupon de naturamantoj kun kuba ne esperantista organizaĵo, sed la funkciado ne estis longdaŭra.

Laŭ niaj spertoj pri similaj klopodoj, por ke tiaj kunlaboraj proponoj estu vere efikaj, ili devus fariĝi reciprokaj.

## **RESUME**

Ni povas resumi ke la sesioj de la kongresa temo estis tre fruktodonaj kaj ilin partoprenis entute centoj da kongresanoj kiuj povis akiri pli da scioj pri la temo.

Kvankam la kongreso ne rezolucios pri la demando starigita de la kongresa temo ni povas, per la formo de Principa Deklaro, renovigi la sintenon de la Esperanto-movado pri la temo:

Konfirmi ke la partoprenintoj de la 9<sup>a</sup> TAKE emfazas la bezonon ke la Esperanto-komunumo pli proksimiĝu al la nuntempaj demandoj starigitaj en la Tagordo 2030 de UNESKO pri kiu KEA havas apartan intereson por labori cele al tio ke niaj membroj kaj aktivuloj sentu ke nia Esperantujo estas vera edukejo.

Ke nia edukejo unue celas disvastigi Esperanton kaj la konscion pri la valoroj de la lingvo kiel kultura trezoro por defendo de la gepatra lingvo;

Ke nia laboro ankaŭ celas la lingvan justecon, kiu kontribuu al lingva ekvilibro, kies sekvoj bone efikos al konservado de diverseco de kulturoj kaj mondovizioj, ĉar tia diverseco garantios pli bonan kaj kvalitan vivon por la sano de nia planedo. Tiuj estas edukaj bazoj por survoji al daŭrigebla evoluo, kiu kontentigu la bezonojn de la nunaj kaj estontaj generacioj.

Kiel ni povas efike kontribui?

La respondo kuŝas en la ĉiutagaj agoj kiujn ni povas entrepreni ene de niaj koncernaj komunumoj, provizante spacon por eduki unue nin mem cele al nova pensmaniero.


Ni vivas en unika planedo kaj ĝuas la privilegion posedi lingvon kiu estas efike uzata por koni aliajn homojn, konstrui amikecon, dialogi surbaze de respekto al la homo kaj ties lingvo, kio estas ankaŭ respekti la kulturon de la aliaj, kaj kune kontribui purigi nian medion, protekti niajn arbarojn, la marojn kaj riverojn, nian komunan domon, nian terglobon. Ĉiu eta paŝo al tiu celo estas ja tre pozitiva paŝo.

Dankon al ĉiuj kiuj aktive partoprenis kaj nun reiras hejmen kun la konvinko ke ni estas parto de tiu homaro kiu konscie kontribuas kaj plu kontribuos al edukado por daŭripova evoluo.

Koran dankon!

**Maritza Gutiérrez González,  
Prezidanto de Kuba Esperanto-  
Asocio, Havano, 17/02/2018**

Bildoj: vecteezy.com







# Sankta semajno en Antigvo-Gvatemala

Fotoj kaj teksto de Lottie Ericson

*Mi* amiko kaj mi vojaĝas multofte januaron, februaron kaj marton ĉiujare. Ni ĵus revenis de Centra-Ameriko, kaj ni havis multe da interesaj spertoj. Ni aŭtobusis de Gvatemala-Urbo tra Honduro kaŝinte de protestantoj de la elekto de la nova prezidanto, tra El Salvadoro grimpite volkanon kun belega kratero, tra Nikaragvo vidinte testudojn kaj ŝarkojn kiam ni naĝis spirtube en la kariba maro, tra Kosta Riko serĉinte ludemajn simiojn, dormemajn bradipojn kaj buntajn avojn, kaj tra Panamo al Panama-Urbo observinte ŝipojn irantajn tra la fama kanalo. Jes, nekredablaj spertoj en ĉiuj de la ses landoj, sed la plej memorinda tempo estis la lasta semajno de nia vojaĝo, la Sankta Semajno en Antigvo-Gvatemala, populara loko la tutan jaron sed principe ĉirkaŭ la paska feriado.



Maya vendistino entradicia vestaĵo

Antigvo estas UNESKOa loko kun belegaj hispanbarokaj konstruaĵoj kaj koloniaj preĝejoj. Oni povas viziti ruinojn, la rezulton de tertremoj en 1717, 1751 kaj 1775. La plej multaj homoj transloĝiĝis aliloken sed revenis en la dudeka jarcento kaj tiutempe konstruis domojn ĉar Antigvo estas ĉarma loko, kvankam loko de pli da tertremoj kaj ebleco de vulkanerupcioj. La vulkano Fuego ofte subbruas, kaj kelkajn tagojn antaŭ Pasko tio okazis kaj cindro falis.

Antigvo nun havas 40.000 loĝantojn sed kiam piedirante en urbomezo ni sentis ke la urbo estas tre plena kaj viveca. Plaĉas multe al turistoj promeni en la maljuna ŝtonŝtonaj stratoj prenante fotojn, admirante la majaajn virinojn portante siajn tradiciajn vestojn, aĉetante ĉi tion kaj tion de stratvendistoj, foliumante en memorvendejoj de aŭ survoje al restoracioj.

En la vendejoj oni trovas buntajn tekstilojn, mansakojn kaj dorsosakojn, broditajn bluzojn, lignajn skulptaĵojn kaj argilaĵojn. La

plejparto de ĉi tiuj objektoj estas faritaj de la indiĝena loĝantaro en la altaj regionoj aŭ en la vilaĝoj apud Lago Atitlano. La loka merkado ankaŭ altiras homamasojn, kaj estas tre amuzite piediri tien. Ĝi estas grandega kaj vere tre konfuza muzeo.



Ornama preĵejo

La preparado antaŭ Sankta Semajno bezonas multajn personojn por helpi ornamu la preĵejojn, purigi kaj poluri "imagens" statuojn, kiujn homoj (virinoj same kiel viroj) portas en religiaj procesioj de Palmodimanĉo ĝis Pasko. La statuoj estas metitaj sur longaj bele tranĉitaj flosoj, kiuj estas tiom pezaj por porti, ke necesas ĝis cent viroj. Kompreneble por la virinoj la flosoj estas malpli pezaj. Porti ilin estas tre lacema, do estas multaj interŝanĝoj de la portantoj ĉar la procesioj ofte daŭras dek horojn aŭ pli. Malantaŭ la procesioj sekvas granda orkestro.



Floso kun religia statuo kaj portantoj

Antaŭ la procesioj la stratoj estas plenplenaj de personoj kiuj rigardas la faradon de "alfombras" tapiŝoj, uzante segaĵon, lignerojn aŭ pinpinglojn por la fundo, kaj fine buntitan segaĵon por fari ŝablonojn kaj bildojn supren. Ili estas ofte religiaj kaj ofte simetriaĵoj.




Tapiŝo se sakusto



Bunta sakusto



La farado de tapiŝo



Belega tapiŝo

Plaĉis multe al ni rigardi familiojn kaj geamikojn arde labori kaj dum multaj horoj, kio tiam rezultigis mirindajn tapiŝojn, kiujn vi ŝatus admiri dum tagoj. Sed la procesioj okazas ĉiutage dum Sankta Semajno kaj, tuj kiam ili estos finitaj, piedoj marŝos super ili. La tapiŝoj estas faritaj por honori Jesuon Kriston kaj lia lasta semajno sur tero.

La Sankta Semajno plaĉas al pli malpli unu miliono da homoj ĉiujare, ambaŭ religiemaj kaj ne religiemaj. Ĝi certe plaĉus al ni, karaj legantoj. Estas ferio kiun mi plenkore rekomendas!



La farado de tapiŝo



Tapiso de sakusto kaj floroj

# Diplomatio kaj lingvoj | Yury Jakimec

Se ni demandas, "Kian lingvon diplomatoj parolas en internaciaj kunvenoj? Kio estas la lingvo de internaciaj traktatoj?" kelkaj personoj konsideras, ke la lingvo de diplomatio estas la angla. Ili pensas, ke se du landoj devas komuniki sed ili ne havas komunan lingvon, ili uzos la anglan por tiu celo. Kelkaj personoj opinias, ke la lingvo de diplomatio devus esti la franca. La vero estas, ke respondi al tiaj demandoj ne estas tute simpla. Diplomatia *lingua franca* ne ekzistas.

En la paĝo [diplomacy.edu](http://diplomacy.edu) ni povas legi pri la historio de la uzado de lingvoj en la diplomatio. Ni ankaŭ povas diri ke lingvoj ankoraŭ estas gravaj en Internacia diplomatio, kaj diplomatoj devas uzi lingvojn en sia laboro. Landoj bezonas interrilatigi kaj kunlabori por trovi solvojn al komunaj problemoj kaj partopreni en komercaj agadoj. Ĉi-tiuj interrilatoj implicas la uzon de lingvoj.

Konsiderante la nombron de landoj kaj diversaj lingvoj parolataj kiuj ekzistas en la mondo, ni ne ofte vidas landojn, kiuj uzas la saman ĉefan lingvon por interkomunikiĝi. En grandaj areoj de landoj kiuj havas komunan lingvon, kiel en Latin-Ameriko aŭ en la Araba Mondo, tio okazas pli ofte.

La diplomaciaj misioj plejofte kapablas komuniki kun la registaro de la gastiganta lando en ĝia oficiala lingvo. Mi ne volas diri, ke la ambasadoro kaj ĉiuj en la diplomatia teamo povas flue paroli la lingvon de la lando kie ili loĝas. Tamen, tiuj misioj estas engaĝitaj en agadoj kiuj postulas la ĉeeston de profesiuloj kiuj estas kompetentaj en la loka lingvo. Ne multaj personoj scias, ke parto de la devoj de la diplomaciaj misioj estas informi sian propran landon pri la novaĵoj kaj politikaj aferoj en la gastiganta lando.

Duflankaj traktatoj povas prezenti defiojn. Kiam ili estas prezentitaj en skribita dokumento, ili devas havi tre klaran lingvaĵon, kiun ĉiuj partoprenantoj kapablas kompreni. La referenco por tiaj traktatoj estas la "[Konvencio de Vieno sur la Leĝoj de Traktatoj](#)" (1969). La artikolo 33 de tiu teksto rilatas al la uzo de aŭtentigitaj tekstoj en du aŭ pli da lingvoj. Ekzistas neniu mencio de ajna specifa lingvo uzota, kaj ekzistas neniu limo al la nombro de lingvoj uzeblaj. Krom se estas antaŭa interkonsento pri ĉefaj lingvoj, ĉiuj lingvoj estas egale aŭtoritataj. Kutime, la lingvoj uzitaj en duflanka traktato estas la oficialaj lingvoj de la landoj kiuj subskribas ĝin. Foje, la landoj povus konsenti por havi la tekston de la traktato aŭtentigita en "tria lingvo", kiu ne estas oficiala en iu ajn el la partioj implikitaj. Kelkaj landoj specifas ke se "tria lingvo" ekzistas, ĝi devas esti unu el la oficialaj lingvoj de la Unuiĝintaj Nacioj (UN). Dum mia esploro, mi legis pri malsamaj reguloj aplikitaj de malsamaj nacioj. Ekzemple, Francio postulas, ke la franca devus esti uzata en ajna duflanka traktato

subskribita kun ĉi tiu nacio plus la oficiala lingvo de la alia partio, sed ili kontraŭas la uzon de "tria lingvo" en tiu kunteksto. Vidu "La langue des négociations et des accords" en "Règles propres à certaines catégories de textes" (4.1.1, pĝ 470) de "[Le guide de légistique, édition 2017](#)".

Internaciaj traktatoj kun Kanado ĉiam devas havi almenaŭ oficialan tekston en la angla kaj en la franca, kaj la alia partio povas aldoni similan tekston en sia propra oficiala lingvo. En artikolo verkita de prof. Guglielmo Maisto pri problemoj en multlingvaj tekstoj de la traktatoj, li mencias, interalie, la kazon de landoj kiel Belgio, Norvegio kaj Svedio, kiuj senprobleme subskribis [impost-traktatojn](#) nur en la angla.

Interregistaraj organizoj estas organizoj komponitaj ĉefe de suverenaj ŝtatoj. Ili estas establita per traktatoj kaj ili estas gravaj aktoroj en internacia juro. Tiuj organizoj devas havi oficialajn lingvojn por projekti, skribi kaj registri novajn traktatojn kaj



rezoluciojn. Kelkfoje, ili uzas ĉiujn oficialajn lingvojn de la membro-ŝtatoj kaj la plej bona ekzemplo estas la Eŭropa Unio. En la EU, ĉiuj 24 lingvoj parolitaj en la membro-ŝtatoj estas oficialaj. Sed en aliaj kazoj, ili devas elekti kelkajn lingvojn, kiel en la Unuiĝintaj Nacioj, kie la oficialaj kaj laborlingvoj estas 6: la angla, franca, hispana, rusa, ĉina kaj araba. Ankaŭ tiuj estas la oficialaj lingvoj de la specialigitaj institucioj. Interese, se la reprezentantoj de iu lando deziras paroli al la UN-membroj en alia lingvo, li povas fari tiel, sed li devas provizi tradukon de la parolado en almenaŭ unu el la oficialaj lingvoj.

Se vi volas fari karieron kiel diplomato, vi devus ankaŭ konsideri la lernadon de alia lingvo. Ĉi tie estas la listo de la 10 lingvoj, kiujn mi rekomendus por lerni.

- Angla: Mi ne bezonas klarigi, kial la angla estas tiel grava en diplomatio. Ne estas facile trovi internacian organizon en kiu la angla ne estas uzata.

- Franca: La franca estas la sola monda lingvo kune kun la angla kun disvastigita uzo sur kvin kontinentoj. Ĝi estas oficiala lingvo de la Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝiaj institucioj, la Eŭropa Unio, kie ĝi ankaŭ estas unu el la 3 laborlingvoj (la aliaj 2 estas la angla kaj la germana), kaj aliaj internaciaj organizaĵoj kiel la Ruĝa Kruco, Internacia Olimpika Komitato (en la lastaj 2 organizoj, la franca estas eĉ pli grava ol la angla). La franca estas konsiderata ankaŭ la 3-a lingvo en la mondo por negocoj (post la angla kaj mandarena). Geografie, ĝi estas precipe grava en Eŭropo kaj Afriko.

- Hispana: La hispana jam estas la dua plej grava lingvo en la mondo laŭ la nombro de denaskaj parolantoj. Ĝi estas oficiala lingvo en pli ol 20 landoj, en la UN kaj la EU. Ĝi estas uzata en ĉiuj internaciaj organizoj, en kiuj grupiĝas Amerikaj landoj. Ĝi estas ankaŭ kreskanta en graveco por komerco; landoj kiel Usono kaj Brazilo, kiuj ne oficiale parolas tiun lingvon, ofte uzas ĝin. En Rusio, Ĉinio kaj multaj aliaj landoj, grava grupo de

investantoj kaj entreprenistoj provas lerni la hispanan.

- Mandarena: Ĉi tiu norma kaj skribita ĉina lingvo estas oficialaj lingvoj en la Ĉina Popola Respubliko, Tajvano kaj Singapuro. Ĝi estas ankaŭ unu el la oficialaj lingvoj de la UN. Krom la fakto ke Tajvano havas tre malmultan internacian rekonon (ĝi ne estas membro de UN), ni povus diri ke tiu ĉi lingvo ne estas tiel grava, se nur du landoj uzas ĝin. Sed la ĉina estas la plej vaste parolata lingvo en la mondo, kaj Ĉina PR estas la plej granda merkato de la mondo. Fakte, tiu sama lando havas tre aktivan diplomation. Mandarena estos pli grava por iu internacia servo de ajna lando.

- Araba: La araba estas oficiala lingvo en pli ol 20 landoj. La plejparto de la parolantoj de ĉi tiu lingvo vivas en Azio kaj Afriko. Ĝi estas ankaŭ oficiala lingvo en la Unuiĝintaj Nacioj, Afrika Unio kaj la Ligo de Arabaj Ŝtatoj. La politika influo de la arabaj landoj estas kreskanta.

- Germana: Ĝi estas oficiala lingvo en 6 eŭropaj landoj. Ĝi ankaŭ estas oficiala kaj unu el la laborlingvoj de la EU. Ĝia influo estas sentata ĉefe en Eŭropo. La germana estas tre grava por scienco kaj komerco.

- Itala: Ĉi tiu lingvo estas oficiala en Italio, Svislando, San-Marino, kaj laborlingvo en la Sankta Seĝo. Ĝi ankaŭ estas oficiala en EU. Por historiaj kialoj rilatataj al la itala migradoj kaj la fakto ke la itala ankaŭ estas uzita en artoj, ĝi estas tre populara lingvo por esti lernita de diplomatoj kaj aliaj tre edukitaj profesiuloj.

- Portugala: Ĉi tiu lingvo estas oficiala en 8 landoj de la mondo, kaj la ĉefaj aktoroj de ĉi tiu grupo estas Brazilo kaj Portugalio. Ĝi estas oficiala ankaŭ en EU kaj en multaj aliaj organizoj kiel la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj, Organizo de Iberamerikaj-Ŝtatoj, Merkosudo, kaj Afrika Unio.


- Rusa: La Rusa lingvo estas oficiala en la Rusa Federacio. Ĝi ankaŭ havas oficialan statuson en Belorusio, Kazaĥio kaj Kirgizio. Ĝi estas ankaŭ uzata en Ukrainio kaj multaj el la Eks-Sovetuniaj membroj en ilia diplomatio. Ĝi estas ankaŭ oficiala lingvo en la UN.

- Persa: Ĝi ankoraŭ estas grava lingvo en Centra Azio. Ĝi estas oficiala en Irano (kie ĝi estas konata kiel "Farsi"), en Afganio (Dari) kaj en Taĝikio (taĝika) kaj havas influon en najbaraj landoj. La internacia komunumo rigardas al tio kio okazas en tiu areo de la mondo; do, scii la persan estas grava.

Laŭ mia opinio, se vi konsideras diplomatan karieron, scipovi lingvojn estas valorajo. En diplomatio ni devas kompreni unu la alian, kaj havi alternativajn lingvojn por komuniki estas iam helpema. Sed eble la plej grava afero estas, ke ni povas plene kompreni la mesaĝojn kiujn ni ricevas, la dokumentojn kiujn ni subskribas, kaj la traktatojn, kiujn ni promesas respekti. Se estas io kion ni ne komprenas, ni povas peti klarigon en lingvo,

kiun ni plene komprenas, kaj ni povas serĉi helpon de lingvaj profesiuloj. Ekzistas neniu leĝo kontraŭ la uzo de ajna lingvo en internaciaj forumoj. Internacia leĝo lasas la pordon malfermita por aŭtentikigi la tradukojn de la traktatoj en iu lingvo, kaj ili ĉiuj estas egale aŭtoritataj. Lingvoj kaj multlingveco helpas pliigi partoprenon kaj antaŭenigas toleremon.





## Speciala koncerto en Viktorio

La 4an de februaro 2018 okazis speciala koncerto en Viktorio. Bertilo Wennergren vizitis Seatlon (Usono) kaj neniam antaŭe vizitis Kanadon, do mi ricevis la proponon ke li kune kun Alena Adler ŝatus veni al Viktorio por koncerti. La ideo nei eĉ ne eniris la kapon.

Mi bonŝance trovis taŭgan koncertejon en la urbocentro kaj ili ĝuis la okazon viziti nian urbon antaŭ la dimanĉa koncerto. Ili kantis dum tuta horo – multajn tradukitajn kantojn en belaj aranĝoj de gitaro, ukulelo kaj voĉoj. Estis belega komenco de la jaro por nia klubo kaj vere speciala posttagmezo.

Amike,  
Ardeo Mann




# DIVERSAĴOJ

KRUCVORTENIGMO DE TREVOR BROWN

SOLVOJ NUMERO 2017/4

## VINTRO



Transen:

2. Malvarmegas
4. Influenco
7. Kion oni diras kiam malvarmegas (2 vortoj)
10. Ursoj egas \_\_\_ en vintro
12. Malmola akvo
13. Varma hararo
14. Nordaj kaj sudaj zonoj
15. Ferio en decembro
16. Decembro 21, 2017
17. Varma mantelo

Malsupren:

1. Malsanu kiu havas kataron kaj tuson
3. Flugi suden antaŭ vintro
5. \_\_\_ sur manoj
6. Blanka \_\_\_ falas
8. Varma ortangul'
9. Sankta
11. 1° estas \_\_\_

Nu. Ĉi tie finiĝas la revuo.  
Komentu ĝin, skribu al ni, sendu  
kontribuaĵojn, kaj atendu la  
venontan numeron de Lumo!

**Redaktorino:** Kamila Koziej Lévesque

**Enketisto:** Geoffrey Greatrex

**Provlegantoj:** Bob Williamson, Geoffrey  
Greatrex, Francisko Lorrain

**Kompostado:** Kamila Koziej Lévesque

**Kontribuantoj:** Detleft Karthaus,  
Geoffrey Greatrex, Bob Williamson,  
Ardeo Mann, Kamila Koziej Lévesque,  
Ĵenja Amis, Zdravka Metz, Lottie Ericson,  
Yury Jakymec, Trevor Brown

